

# Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto  
**133**  
somero 2023



leĝa depono ĉe BNF  
ISSN 2609-5203

**federacia retejo**  
<http://www.esperanto-provence.org>

**prezidanto**  
Pierre Oliva  
Eden Park n° 99  
2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
06 76 55 57 23  
nlpolecamp@gmail.com

**aliĝkotozo (kun la gazeto): 6 €**  
> ĉeko al: Espéranto-Provence  
pere de via loka asocio  
aŭ sendota al la kasisto  
Nicole Lafitte  
(ĉe la supra adreso de P. Oliva)  
> aŭ bankĝiro  
(bankinformoj ĉe la sekretario)

**sekretario kaj redaktoro**  
Pascal Vilain  
48 avenue Alexis Godillot  
83400 Hyères  
06 42 19 68 51  
pascalvilain83@gmail.com

**limdato por sendo de  
publikotaĵoj por la venonta n°**  
25-a de septembro 2023  
bonvolu sendi al la supra retadreso  
><><  
antaŭdankojn pro viaj kontribuajoj

## Vorto de la redaktanto

Unue mi ŝatus, nome de la tuta federacio, deziri al nia prezidanto Pierre rapidan resaniĝon. Ĉi tiu somera numero 133-a de nia gazeto estas la unua kun nova formato. Mi devis iel adaptiĝi, aldoni paĝojn sen ŝanĝi la tiparon. Mi esperas, ke la rezulto kontentigos vin. Vi eble pasigos venontajn tagojn aŭ semajnojn en Esperantujo... Se jes, ne hezitu raporti kaj foti por la oktobra gazeto. Agradelegan someron!

*Pascal*



## enhavo

2	> federacia agado > el la provencaj asocioj	12	> nekrologo
8	> vojaĝemaj federaciaĵoj	15	> ekspozicio Bernard Briançon
11	> federaciaĵoj esprimas sin skribe	16	> agendo

## Federacia agado

La komitato de nia federacio kunvenis la 16-an de junio ĉe Jean-François Cousineau, en Lorgues (83).

Grava pritraktata punkto de la kunveno estis la estonteco de la Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres, pri kiu zorgas de nun Jean-François, helpata de kelkaj komitatoj kaj aliaj federacioj.

Pri la venonta MES vi ekscios verŝajne en la oktobra numero de nia gazeto. Dum tiu kunsido, ni parolis ankaŭ pri la ŝanĝoj rilate nian gazeton (formato, printado, sendo...), pri la ebla novembro staĝo en La Garde,



pri Esperanto-arbo en Correns (83), pri la partopreno de pluraj federacioj en la ĉisomera Universala Kongreso en Torino. Pri ĉiuj tiuj temoj vi povos legi pliajn informojn aŭ raportojn en la oktobra n° 134.

*raportis Pascal Vilain*

## El la provencaj asocioj



### 13 - Espéranto-La Ciotat

Thierry Spanjaard

#### "La langue dangereuse", conférence par Renée Triolle



Le 31 mai dernier, au CIQ Fonsainte, à La Ciotat, Renée Triolle a donné une conférence sur "La langue dangereuse", d'après le livre, titré originel-

lement "La danĝera lingvo", d'Ulrich Lins. Renée a participé à la traduction du livre en français.

Après une brève introduction sur l'espéranto, elle a mis en évidence les reproches qui ont été faits à l'espéranto, non seulement par les dictatures stalinienne et hitlérienne, mais aussi par d'autres gouvernements, de la Russie tsariste à la France de la IIIème République.

En particulier, l'espéranto a souvent été vu comme une langue dangereuse car elle permet aux simples citoyens d'échanger aisément avec des étrangers sans passer par le contrôle des états dictatoriaux. Au cours du temps, divers arguments ont été déployés :

- "L'espéranto est contraire aux intérêts allemands",
- "L'espéranto est la langue des voleurs", en Hongrie,
- "L'espéranto est un danger pour les langues nationales",
- "L'espéranto est un danger pour les langues nationales",

### Renée Triolle

Aux yeux des dictatures et des idéologies fanatiques, l'espéranto est une langue dangereuse qui doit être combattue. C'est notamment le sort qu'elle a connu dans l'Allemagne nazie et dans l'Union Soviétique sous Staline.

L'historien allemand Ulrich Lins montre les conséquences tant de la condamnation hitlérienne de l'espéranto comme outil de la domination mondiale des juifs, que de la liquidation par Staline du mouvement espérantiste ouvrier soviétique et ses pratiques transnationales.

- "L'espéranto détruirait la culture s'il était introduit dans les écoles", en Allemagne,
- "L'espéranto menace l'éducation à la culture latine car il est trop facile", en France,
- "L'espéranto répandrait les idées nuisibles à la population" en Russie, Etc.

Pour conclure sur une note plus positive, Renée a couvert les avantages de l'espéranto dans le monde actuel... avant que le CIQ ne propose un bref apéritif.

La première édition du livre a été publiée en Allemagne en 1988 (réimpression à Moscou en 1990). Après la chute du mur de Berlin, d'autres sources sont devenues accessibles et l'auteur a révisé et enrichi ce livre, déjà traduit en allemand, italien, russe, lituanien, coréen, anglais.

Sous la direction de Pierre Dieumegard, une équipe de traducteurs (*ndlr: dont Renée Triolle*) s'est attaquée à la traduction en français.

#### **Titre de l'ouvrage:**

**"L'espéranto, langue dangereuse : une histoire des persécutions sous Hitler et sous Staline"**

**éd. L'Harmattan - 2022.**

*Plej ofte ni raportas en Espéranto-Provence pri agado de konataj homoj. Mi proponas prezenti la novajn homojn kaj mi komencas per unu lernanto en Marsejlo, kies feriado estas pensiga. La intervjuon gvidis **Renée Triolle**, kiu zorgas pri kurso ĉe CIRA; respondas **Christophe Roux**, lernanto ekde decembro 2022.*

## Originala feriado

### ***Kiu kaj kio vi estas?***

Mi nomiĝas Kristofo, mi estas flegisto kaj violonisto.

### ***Kie vi laboras?***

Mi laboras en Marsejlo en sencentro de popola kvartalo.

### ***Kiel vi malkovris Esperanton?***

Mi ŝatas aŭskulti prelegojn ĉe CIRA / Centre International de Recherche sur l'Anarchisme. Mi iam aŭskultis prelegon pri Esperanto kaj malkovris, ke estas ligo kun anarkiismo. Mi venis al la kurso. Mi unuafoje aŭdis pri Esperanto, kiam violonistino parolis al mi pri ĝi, ke ĝi estas pacmovado. Nun mi lernas kaj mi malkovris, ke amikoj (Viktor, Emma) estas esperantistoj!

### ***Rakontu pri viaj ferioj.***

Mia laborejo estas fermita du semajnojn en aŭgusto, sed iam mi feris dum ses semajnoj: mi per motorciklo veturis ĝis Kartvelio / Géorgie, en Kaŭkazio.

### ***Vi estas aventurema. Ĉu ankaŭ ĉijare?***

En aŭgusto mi piediros kun amikoj-asocioj en suda Centra Montaro, de vilaĝo al vilaĝo, kaj ni animos la lokan vivon. Ni ne havas buĝeton, ni dormas sub ĉielo kaj vivas el tio, kion la vilaĝanoj donis al ni.

### ***Ĉu vi almozpetas?***

Tute ne; mi ludas violonon, amikon ludas alian instrumenton. Ni elektas viziti vilaĝon dum estas semajna bazaro, bona okazo konatiĝi kun homoj, animi la vilaĝon kaj vivigi la lokan vivon.

### ***Kian muzikon vi ludas?***

Ĉian; dependas de la muzikistoj; ni ludas klasikan, folkloran, tradician, modernan muzikojn.

### ***Rakontu pri unu tago.***

Ni ellitiĝas je la 7a, piediras 9-11 kilometrojn, t.e dum 2-3 horoj, elektas lokon, kie ni povas tranokti subĉiele, ni aĉetas manĝaĵon kaj kuiras.

### ***Se pluvas...***

Ĝenerale troviĝas bonkora homo, kiu proponas ŝirmilon!

## Ĉu la itinero estas fiksita?

Ni decidis nur pri la regiono (ĉijare Cevenoj, Lozero), poste ni adaptiĝas laŭ la lokaj aranĝoj (bazaro, festivalo, festoj).

## Ĉu kuniras sentalentuloj?

Povas veni iuj, kiuj nek muzikas, nek pentras ktp. Sed ĉiu povas kontribui, ekzemple dum "Parentezo": iu masaĝas, dum iu legas poeziaĵon kaj alia muzikas. Povas partopreni iu ajn (maljunulo, patrino kun infano) sen diskriminacio, ni adaptiĝas.

En la grupo povas esti 5 aŭ 20 homoj!



*Christophe, meze, kun sia violono*

## Kio plaĉas al vi en tiu feriado?

Ĉio: la marŝado, la pejzaĝoj, kunestado kun geamikoj, plezuro de la publiko, renkontoj kun diversaj homoj, gastemo. Unuvorte: aventuro.

**Ni dankas. Havu agrablan feriadon!**



## 05 - Espéranto-Gap

Dimanĉon, la 25-an de junio, en Gap, okazis la kutima **Pacmovado-Festo**.



*raportis Monika Arnaud*

Ĝi okazis en ne kutima loko: *La Maison Diocésaine*, kaj ŝajnas ke kelkaj asocioj ne pretis veni en tiun lokon do estis malmulte da budoj.

Claire kunportis komputilon por prezentado de la lingvo kaj aŭskultado de Esperantaj kantoj. Danke al la 2 albumoj de Virginie Kremp, *Le Corbeau and the fox* kaj *Le Corbeau y el zorro*, vizitantoj havis la plezuron legi tiun fabelon aŭ en sia gepatra lingvo aŭ en bone konata lingvo, tiel Esperanto aperis samnivele!



## 83 - Espéranto-Lorgues

Ĵaŭdon, la 29-an de junio, okazis la ĉiumonata Esperanto-kafumado en Lorgues, en tre bona amika etoso, kiel kutime.

La onta renkontiĝo estis jam planita por la fino de septembro.





Pascal Vilain

Dimanĉon, la 25-an de junio, la Esperanto-klubo de Fréjus - Saint-Raphaël invitis al tagmanĝa kunveno en Les Issambres, en la restadejo Miléade kie de jaroj okazas la fama Mediteranea Esperanto-Semajno.

Partoprenis 24 samideanoj, al kiuj aldoniĝis 3 esperantistoj el Montpellier, kiuj venis speciale, laŭ invito de la organizantoj, por prelegi pri **origamio**.

Post la tagmanĝo, abunda kaj bona gusta kel kutime tiuloke, la partoprenantoj kuniĝis en prelegsalono por ekscii pli pri origamio, la konata japana arto pri paperfaldado.

Lerte prezentis tiun arton Larysa Osadchuk, ukrainino loĝanta en Montpellier, helpata de Anastasia Ermakova kaj Alain Delmotte, membroj de la Origami-klubo EsperOri, kiu kunvenas ĉiumerkrede en la ĉefurbo de la departemento Hérault.



*Atenta publiko aŭskultas la klarigojn de Larysa*

por scii pli: [accorigami@gmail.com](mailto:accorigami@gmail.com)

Post spektado de multaj lumbildoj pri la diversaj aplikadoj de origamio (*vidu prian tekston ĉi-sube*), venis trejnekercoj per paperfolioj... kaj tiu momento videble plaĉegis al la ĉeestantoj, kiuj iel retrovis sian infanan animon kaj memoraĵojn el la lernajaj jaroj.



*Jen kion skribis Larysa Osadchuk pri origamio sur Youtube:*

"Nuntempe origamio vivas sian novan vivon, trovante aplikadojn en scienco, tekniko, arkitekturo, dezajno, pedagogio kaj artoterapio. Origamio havas grandan potencialon en pedagogio; same kiel Esperanto, origamio indas esti enkondukata en lernejoj por iĝi tre grava baza kono por harmonia disvolviĝo de infanoj.

Origamio kaj Esperanto havas multajn komunajn trajtojn: precizeco, logiko, simpleco por lerni kaj instrui, ambaŭ baziĝas sur la principoj de neceso kaj sufiĉo. Ili ŝparas al ni tempon kaj mensan energion, instigante nin trovi la plej efikan rezulton. Ambaŭ ili kreas konfidan etoson, alportas senton de feliĉo kaj ĝojo en komunikado."



## Amikeco sen limoj

Okaze de la Montreala Universala Kongreso en la somero 2022, ni renkontis multe da esperantistoj el diversaj landoj. Kelkaj iĝis niaj korespondamikoj. Ni ekzemple konatigis kun Joël Fontaine kaj Laure Wolff, el Strasburgo. Kun ili, ni starigis korespondadon kaj interŝanĝon de fotoj de ĉiuj Esperanto-eventoj, en kiuj ni partoprenis.

Ĉu distanco ĝenas amikecon? La respondo por esperantistoj estas: ne! En aprilo, niaj geamikoj venis viziti nin, je 870 km de sia hejmo. Kun grandaj plezuro kaj ĝojo ni gastigis ilin.

## Carmen Segarra

Fine de majo, iun semajnfino, mi gastigis, pere de Pasporta Servo, ukrainajn esperantistinojn. Ili loĝas en Bretonujo kaj venis viziti nian regionon. Ĉar tiam okazis en Cannes la fama kinfestivalo, ili tien iris unue por ĝui la festivalan etoson, antaŭ ol veni al Saint-Raphaël.



*Carmen, dekstre, kun siaj gastoj*

Ni kune vizitis nian belan Provencon: Les Arcs-sur-Argens, Tourtour, Villecroze, Sillans-la-Cascade. Ni pasigis kun ili kelkajn neforgeseblajn tagojn.



*Laure kaj Joël*

Ni antaŭĝojas revidi unu la aliajn okaze de la ĉisomera Universala Kongreso en Torino.

Ĝis la revido, karaj geamikoj niaj!

Ni babilis Esperante, kvankam ili bone regas la francan. Al ili mi vizitigis mian urbon kaj konatigis miajn geamikojn. Ni kune vizitis la urban Kulturcentron, kie ili ambasadoris kiel esperantistoj.

Dum du tagoj ekzistis do en Saint-Raphaël Esperantujeto!

Bonvenon miaurbe al pliaj Esperanto-ambasadoroj!

Se vi ne bone scias, kio estas Pasporta Servo... aŭ se ankaŭ vi ŝatus gastigi samideanojn... jen retejo, kie vi trovos ĉiujn priajn informojn.

<https://www.pasportaservo.org/>



### Roselyne Favier

La 11-an de junio, nia Esperanto-klubo piknikis en Barbentane, inter Avignon kaj Tarascon, apud la abatejo Saint-Michel de Frigolet.

Estas multe da lokoj por marŝi, bicikli, ktp., meze de arbareto.

Malfeliĉe, incendio tie bruligis multajn arbojn, pasintjare en julio. Sed la loko estas tiel vasta, ke ankoraŭ eblas trovi verdaĵojn.

La tago estis tre agrabla.

Ni estis nur ok (el kiuj kvar esperantistoj). Ni ne povis ne krokodili...male al tio, kion esperis Renée Triolle.

Ni nenion vizitis, sed manĝis kaj france babiladis. Rose-Marie kunportis ludon, kiu ebligis parole nombri en Esperanto. Eĉ la ne-esperantistoj povis iomete ludi.

Je la kvina kaj duono, kelkaj pluvgutoj decidigis nin foriri.

Eble tiu pikniko estas la lasta de la Avinjona Esperanto-grupo, ĉar mi ne scias ĉu nia grupeto plu vivos.

Partoprenis la piknikon Rose-Marie kun siaj edzo kaj filino, Bernard Bigonnet, Olivier Maury, mi kun Georges kaj amiko de li (kiu kelkfoje ĉeestis Esperanto-kurson).

Renée Triolle, Josiane Moirand, Céline Bernard, Christian Mouré kaj Hélène Kazejust sciigis al mi, ke finfine ili ne povas partopreni.

Neniu ĉeestanto pensis pri fotoj... mi bedaŭras tion.



### Vojaĝemaj federacianoj...

Membroj de la federacio Espéranto-Provence: Monique Arnaud, Bernard Bigonnet, Philippe Chavignon, Roselyne Favier, Marc Gallardo, Rosy Inaudi, Thierry Spanjaard kaj Renée Triolle partoprenis en la...

### Interasocia kongreso en Liono de la 6-a ĝis la 9-a de majo

#### Renée Triolle

Pompa nomo de la kongreso de Espéranto-France ĉar samtempe kunvenis la regiona asocio ILEI-France (la instruistoj) kaj EDE.

Apartajn dankojn al la LKK, sub gvido de Andrea Bertrand, kiu aranĝis

agrablajn restadkondiĉojn: tranoktado en restadejo atingebla per rekta aŭtobuso, familia kongresejo en Domo de la Italoj, kun konstante funkcia trinkejo kaj ebleco diskuti, tre sukcesa "aperitivo" abunde provizita de la grupo de Liono kaj



specialaĵoj portitaj de la kongresanoj, azia tagmanĝo freŝe preparita surloke en rilato kun historiaj ligoj de Liono kun Azio laŭ la Silka Vojo.

La LKK kaptis la okazon varbi ĉe ekstera publiko: rapidaj kursoj, prezento de Esperanto laŭ la skemo de Espéranto-France, prelego en la franca de Virginie Kremp kaj Greta Franclet: "Kiel valorigi lingvojn en la socia kaj publikiga medio", temo konata de ni, kiuj de jardekoj celebras la Tagon de gepatra lingvo la 21an de februaro, sed eble nova temo por la neverduloj; prezento de Esperanto en la lernejoj kaj aliaj medioj far Michel Dechy.

Se dum la kongreso mem ne amase interesiĝis la lionanoj, ni esperu ke ni semis kaj semis.



Kiel kutime, kongreso estas okazo kleriĝi, aŭskultante diverstemajn prelegojn: pri Tony Garnier, urboplanisto, kiu planis la modernan

Lionon (Renée Triolle), pri Fratoj Lumière, kiuj inventis kinon (Pascale Voltaire), pri Observado de la kosmo (Marc-Olivier Graziani, nova kaj juna lionano), pri Lumo kaj vivuloj (Marilyn Voltaire).

Okazo ankaŭ konatiĝi kun kulturo, ĉi-jare regis muziko: karaokeo de Laŭrenco Tommazelli, koncerto de Radio Mondo el Danlando kun akordeono kaj fluto (Kim suferis pro la varmo, do verŝajne li ne aperos en Torino nek en Tanzanio en 2024!), Gijom Armid ĉe piano aŭ akompanata de Melono, kiu majstre zorgis pri sonorigo de la salono. Funkciis librovendejo, majstrita de Said kaj Marianne kun disdono de la ĵus aperinta «Le Monde de l'espéranto».

Okazo ankaŭ konatiĝi kun la regiono! Ses piedaj ekskursoj tra la urbo (eĉ perturbitaj de la neatendita vizito de Emmanuel Macron la 8-an de majo, kiu devigis la LKK ŝanĝi itineron kaj salonojn) kaj marde, vizito al Saint-Étienne, ekologia ĉar pertrajna!

Normale, kongreso estas la forta renkontiĝo de la asocio kun ties membroj, laŭ mi la plej malforta parto de la kongreso: duonhora malfermo, tute ne formala, kun prezidanto en T-

ĉemizo, kiu nur prezentis la LKK-anojn, membrokunveno (jam voĉdonitaj estis ĉiuj raportoj do sen-senca posta diskuto; tamen dis-kuto de la buĝeto kun klarigoj de Paul Quévy estis tre interesa), tre informplena prelego de Emmanuelle Richard pri la eldonpolitiko kaj konsiloj. Mi sentis fortan mankon, ke ne estis fermo, kun prezento de la nova estraro.

Kunvenis ankaŭ EDE sub gvido de Pierre Dieumegard, kiu kun Marcelle Provost kaptis la okazon glui la novajn afiŝojn pri «Esperanto, lingvo por eŭropanoj».



Kie estas demokratio en Eŭropa unuiĝo, kiam 95% de la oficialaj dokumentoj aperas nur en la angla, lingvo konata nur de 10% de la civitanoj?

ILEI-France bedaŭris, ke mankas profesiaj instruistoj inter la francoj, tiel, ke malfacilas aliri la instruistojn kaj pere de ili la lernejanon. Ĉu kopii la italojn kun la 30-horoj?

Konklude, agrabla restado en neformala etoso, kun kontaktoj ne nur kun francoj (nin vizitis germanoj, nederlandanoj, danoj, kartvelino) kaj kutima konstato: mankas junuloj eĉ se ne mankis 30-40-jaruloj, sed bedaŭrinde ili havas sian propran programon do ne aperas en la ĝeneralaj kongresoroj...

## Bonan vojaĝon!

Alain Rémy foriris la 2-an de julio por nova bicikla vojaĝo tra Eŭropo:



Italio (Torina UK), Slovenio, Hungario, Slovakio, Aŭstrio, Germanio Francio. Sume: 6 000 km dum 3 monatoj



### Konkurseto de "Mojosa Mondo"

Mojosa Mondo estas Fejsbuka grupo, kiu fojfoje proponas konkurson. Ekzemple, jen tio, kion skribis la grupo en majo:

*"Amikoj, alvenos la Internacia Infana Tago (la 1-a de junio). En ĉi mirinda tago, Mojosa Mondo volus inviti vin rakonti pri "La plej memorinda afero en mia infanaĝo". Eble ĝi estas la ĝojo lerni Esperanton unuafoje, eble ĝi estas la ekscita aventuro, eble ĝi estas la helpo el fremdulo ktp. Bonvole skribu en la komenta areo, ni elektos la tri plej bonajn kaj afiŝos ilin en la Internacia Infana Tago."*



Partoprenis en la konkurso nia samfederaciano **Paulette Chiarisoli...** kies teksto estis elektita! Gratulon al ŝi!

Jen ŝia teksto:

"Mi pensas, ke la plej memorinda afero de mia infanaĝo estas la vojaĝo de Parizo al mia feriejo.

Ĉiujare, la tuta familio: miaj gepatroj, mia frato, mia fratino kaj mi foriris tre frue, direkte al la sudo de Francio, en nia malgranda Renault 4 CV.

Mia patro skribis al ni la itineron kaj ni sekvis la liston, urbon post urbo.

La pejzaĝoj estis mirindaj por mi kaj longe antaŭ ol alveni, mi flaris la odoron de la maro kaj de la mediteraneaj plantoj, mi aŭdis la cikadojn kaj la akĉenton de niaj amikoj. Mi vidis la pinajn montetojn.

Estis feliĉa vojo plena de estontaj revoj kaj plezuroj.

Nun, jam de multaj jaroj, mi plezure loĝas en tiu regiono kaj delonge mi ne plu iras ĉi tiun vojon."

## Nekrologo

Nia federacio bedaŭrinde perdis tri el siaj membroj, forpasintaj en la lastaj monatoj: Denise Loisel kaj Roger Siarri en aprilo, Mari-Roza Vilain en majo.

Espéranto-Provence sincere kondolencas iliajn familianojn kaj geamikojn.

### Denise Loisel (1936 - 2023)



*Denise kaj ŝia edzo André,  
fotitaj en Les Issambres en junio 2012*

**Denise Loisel** naskiĝis en Le Havre la 24-an de majo 1936.

Ŝi konatiĝis kun André kaj kun Esperanto en 1961 en Rouen.

André kaj Denise geedziĝis en 1963, kaj transloĝiĝis al Saint-Raphaël en 1981.

Ambaŭ partoprenis en multaj Universalaj Kongresoj.

Denise abunde korespondis kun esperantistoj el Japanujo, Germanujo, Anglujo... kaj tion plu faris ĝis la ĉijara januaro.

Ŝi estis katŝatantino kaj posedis belan kolekton de porcelanaj kaj vitraj katoj.

De 2007, ŝi prezidis nian Esperanto-klubon de Fréjus – Saint-Raphaël.

Denise forpasis la 6-an de aprilo 2023, je la aĝo 87-a.

*Christine Graissaguel*

## Roger Siarri (1931 - 2023)



*Kvankam Korsiko ne apartenas al nia regiono PACA, Roger ĉiujare aliĝis al nia federacio. Mi ne persone konis lin, sed ĝuis la fojfojajn telefonajn konversaciojn, kiujn mi havis kun li.*

*Pascal V.*

La 26-an de aprilo 2023, **Roger Siarri** forlasis nin.

Mi konis Roĵe Siarri dum mia milit-servo en Alĝerio, 1960.

Li trasuflis Esperanton en mian nazon kaj de tiam mi uzas nian Internacian Lingvon.

Ĉio estis bona. Kaj tio povintus daŭri ankoraŭ longe, sed ŝajne muŝo pikis lian nazon; Roĵe, forpelante la insekton, falis planken sen diri «ĝis»; li tuj mortis, en Korsiko; mi estas trista; li ne rajtis tiel malĝentile nin lasi.

Sed la daŭro de la vivo estas mistera. Por tiuj, kiuj lin konis, en ilia koro restas lia bela rideto.

*Charles Carrey*

*ndlr: En letero, kiun Roger sendis al mi, li tion skribis:*

*"Mi ĉiam praktikis l' humuron kun miaj matematikaj lernantoj, kaj mi bone konstatis, ke mia fako estis tiam pli facile lernebla!*

*Cetere, la fama verkisto Montaigne prave diris:*

*"Tago sen rido estas tago malŝparita."*

*Jen do, omaĝe al Roger, humura teksto originale verkita de li.*

### **Prestiĝa parenceco**

Iu vilaĝano, kies amata patrino forpasis, volis ke la paroĥestro faru belan ceremonion por ŝia entombigo.

La tagoj forflugis, sed la kamparano neniam pensis pri la elspezoj de la enterigo.

La pastro finfine decidiĝis, kaj iris al la vilaĝano. Iom embarasita, li demandis lin:

"Ĉu vi ne opinias, ke post tiom da monatoj, vi devus pensi pri via ŝuldo?"

La kamparano milde respondis:

- Mi bone volus, via pastra moŝto, sed bedaŭrinde, mi tute ne havas monon! Mi ĉiam malsanas, mi ne kapablas labori, kaj malgraŭ mia bonvolo, mi tute ne povas doni al vi vian monon.

- Sed, daŭrigis la pastro, ĉu vi ne havas iun familianon, kiu povus vin helpi?

- Ho! Mi havas nur unu fratinton, sed ve! Ŝi tiom malbone kondukis...

- Ha! La kompatindulino, respondis la paroĥestro. Sed, bonvolu diri al mi tion, kion tiel hontinda ŝi faris.

- Ho! Kia malfeliĉo! Sciu, ke ŝi fariĝis religiulino...

- Sed tute male! Ŝi kondukis perfekte. Pri kio vi plendas? Via fratino edziniĝis kun nia Sinjoro Jesuo Kristo!

-Tiam, rebatis la ruza kamparano, bonvolu vin adresi rekte al mia bofrato por la pago de mia ŝuldo..."

### Mari-Roza Vilain - De Wolf (1959 - 2023)



Ĉu povas esti pli malplaĉa kaj stranga tasko por gazetredaktanto ol verkado de nekrologo pri sia propra edzino? Mi ne povis imagi, ke tion mi iam devige faru, sed tiel estas...

Kion skribi pri **Mari-Roza**, forpasinta la 31-an de majo, post 9-monata malsano, en sia 64-a jaro?

Mi ŝatus diri nur, ke ŝi estis mia kara edzino, mia amata princino...

Mi tamen aldonos iom da detaloj pri ŝia vivo en Esperantujo.

Mari-Roza eklernis Esperanton en 1986, en Aalst (Belgujo, ŝia naskiĝlando) kaj tuj partoprenis, samjare, en Internacia Junulara Kongreso en Neurim (Israelo). Sekvis por ŝi la Jubilea Universala Kongreso de 1987 en Varsovio; poste IJK en Zagrebo en 1988; UK-oj en Brajtono (Britujo) en 1989, en Havano (Kubo) en 1990, en Bergeno (Norvegujo) en 1991. Mari-Roza kreis kaj prezidis la Esperanto-klubon de Aalst.



Ni konatiĝis en novembro 1994, okaze de semajnfina staĝo en Morbecque (en la franca Flandrujo) kaj tuj enamiĝis. Nia geedziĝo okazis en Dunkirko en junio 1996, kaj de tiam, Mari-Roza vivis kun mi en Francujo.

En Dunkirko, ŝi zorgis kun mi pri la asocio «Dunkerque-Espéranto». Kune, ni ĉiusemajne instruis Esperanton, organizis kongresojn de la Norda Federacio, vizitigis kun Esperantaj klarigoj la Dunkirkan havenon, la ĉarman urbeton Bergues (tiun de la filmo «Bienvenue chez les Ch'tis").

Ni tre regule partoprenis en staĝoj en Kvinpetalo - kie ni multe lernis i.a. danke al Georges Lagrange, Claude Gacond, Katalin Kováts... - kaj en la UK de Montpellier en 1998.


En 2005, ni transloĝiĝis al la sud-orienta parto de Francujo, kie ni rapide retrovis Esperantan vivon, gvidante kursojn en Cannes, kiam ni loĝis en Saint-Vallier de Thiey, kaj poste en Les Issambres aŭ Le Beausset, de kiam ni loĝis en Taradeau.

En 2019, ni instaligiĝis en Hyères, kie ni iniciatis lingvan kafejon. Ni intencis kune plu labori por nia ŝatata lingvo. La sorto decidis alie. De nun, nur sole kaj malgaje mi daŭrigos mian agadon, omaĝe al mia karega Mari-Roza... Iel trankviligas min, ke ŝi ne plu suferas.

*Pascal*

## Ekspozicio de Bernard Briañon

Ni memorigas al vi, ke plu videblas en Mouans-Sartoux (06), ĝis la 11-a de novembro, la ekspozicio "**Alice**" de **Bernard Briañon**, membro de nia federacio.



*Bernard  
Briañon  
apud unu  
el siaj verkoj*

Akompanas la ekspozicion kreado de nova parfumo: "**Mirlando**".

*loko:* Jardins du Musée International de la parfumerie

979 chemin des Gourettes

06370 Mouans-Sartoux



## À noter sur votre agenda

### dans notre fédération

**Plusieurs cafés linguistiques "espéranto" :**

**1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille (13)**

La Passerelle - 26 rue des Trois Mages (près du Cours Julien) - 6ème

infos : *Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51*

**dernier mercredi de chaque mois - 18 h - Hyères (83)**

bar de l'hôtel Ibis-Gare - 45 rue Edith Cavell (face à la gare)

infos : *Pascal Vilain - 06 42 19 68 51*

**dernier jeudi de chaque mois - 17 h - Lorgues (83)**

"Carnets de voyage" - 12 avenue Allongue (rue face à la mairie)

infos : *Jean-François Cousineau - 06 82 53 52 02*

**décembre 9 & 10 - La Garde (83) - Domaine de Massacan**

Week-end culturel - infos dans le n° d'octobre

**2024 mars 9 -16 - Les Issambres (83)**

MES - Semaine méditerranéenne d'espéranto

### en France

*pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs*

**Baugé (49) - Château de Grésillon**

<http://gresillon.org/?lang=fr>

**Bouresse (86) - Kvinpetalo**

<http://www.kvinpetalo.org> (*retejo ne alirebla dum la gazetenpaĝigado*)

**août 13-19 - Métabief (25)**

Stage avec cours 3 ou 4 niveaux, excursions, concerts, conférences, jeux...

<http://eventaservo.org/e/Metabief2023>

### en Europe

**juillet 29 / août 5 - Turin (Italie)**

108ème Congrès universel d'espéranto

**août 5-12 - Lignano Sabbiadoro (Italie)**

Congrès internationaux de ILEI et de TEJO (IJK)